### 1. De Thannenkirch (Alsace) à Nagasaki (Japon)

Alphonse MISTLER naquit le 5 février 1873 à Thannenkirch, en Alsace, à 9 kilomètres de Sélestat. En 1892 il quitta l'établissement de formation des maîtres de Ruis Orangis et enseigna dans un collège de Besançon. Il devint prêtre dans la "Société de Marie" créée par Guillaume Joseph Chaminade. On appelle ces prêtres marianistes et ils s'occupent avant tout d'enseignement.

Son frère aîné, Jean MISTLER, qui était directeur de l'Ecole Secondaire Libre de Saint-Claude\* (Département du Jura) était un espérantiste convaincu. Comme celui-ci parla à son frère du Docteur Zamenhof, créateur de la Langue Internationale Espéranto, Alphonse apprit la langue.

Jean et Alphonse MISTLER, ainsi que plusieurs habitants de Saint-Claude, étaient enregistrés dans l'annuaire des premiers espérantistes et le Docteur Zamenhof écrivit à Alphonse MISTLER et lui demanda d'enseigner l'espéranto au Japon. Malheureusement cette lettre brûla lors du grand tremblement de terre de Kantō.

En 1892 il s'installa au monastère de la filiale de la Société de Marie à Nagasaki. Il enseigna la physique et la chimie dans le collège privé "Kaiseigakko" à Nagasaki, qui venait d'être créé l'année précédente. Il habitait au numéro 2 de Higashiyamate à Nagasaki et enseignait l'espéranto à une soixantaine de collégiens.

Le 26 novembre 1902 parut un article de Alphonse MISTLER dans le journal en langue anglaise « NAGASAKI PRESS ». Ce fut le premier article qui parla de l'espéranto au Japon. L'historien Katsumi KUROITA lut cet article , apprit l'espéranto et fonda l'Association d'Espéranto du Japon. (Cet article fut retrouvé en 2003 par un espérantophone japonais, Monsieur Yasumasa MORIWAKI)



Jean MISTLER

Comme Alphonse MISTLER recevait de nombreuses lettres de l'étranger, il fut

soupçonné d'espionnage par la police japonaise lors de la guerre entre le Japon et la Russie . Il subit même un interrogatoire à la suite duquel il ne participa plus aux réunions du club d'espéranto, craignant sans doute des pressions de la part des autorités. Peut-être avait-il aussi entendu parler de l'Ido, une langue planifiée concurrente créée par un ancien espérantiste français, De Beaufront.

Il enseigna alors la physique et la chimie à l'école secondaire "Gyosei" de 1909 jusqu'en 1912. Puis il revint à l'école secondaire "Kasei" d'avril 1912 à mai 1934, lui et deux autres marianistes d'origine alsacienne, Célestin RAMBACH et Albert BLETZACKER . Les élèves de l'école Kasei les appelaient « les trois corbeaux » à cause de leurs soutanes !

Alphonse MISTLER enseigna gratuitement la physique et la chimie pendant plus de 25 heures par semaine et ses élèves appréciaient la précision de ses explications. Il s'occupait en outre d'œuvres de bienfaisance, de la bibliothèque, des malades et du service de reprographie. Il est aussi l'auteur d'un dictionnaire français-anglais et était détaché à l'Ecole de Commerce Nagasakikoutoushyogyo-gakko pour l'enseignement du français.

Il habita à Nagasaki pendant 39 ans, ensuite il s'installa d'abord au Collège Saint-Joseph à Yokohama en avril 1934. Il prit la nationalité japonaise. Son nom japonais était Saburo MITSUTERU , une transposition de MISTLER en japonais. À plus de 70 ans il marchait encore d'un pas alerte ; il avait d'ailleurs toujours aimé la marche, surtout en montagne. Il s'intéressait à tout ce qui était original, mais il était toujours resté modeste et dévoué, très chaleureux, tout en étant très ferme. Il était invariablement vêtu d'une redingote noire et d'une cravate noire.

En 1944 la Société de Marie décida d'acheter un hôtel, l'Hôtel du Parc, à Goura (Hakone) et y logea les marianistes étrangers.


Alphonse MISTLER est mort à Yokohama le 17 mai 1953. Il avait 81 ans. Sa tombe se trouve au Cimetière de la Société de Marie dans la onzième parcelle du Cimetière pour Etrangers.



\* Nous remercions bien chaleureusement les espérantistes japonais qui nous ont donné tous ces renseignements sur Alphonse MISTLER. Nous espérons aussi pouvoir vous présenter un jour la biographie de son frère Jean MISTLER, mais malgré l'aide précieuses de nombreuses personnes contactées, nous n'avons pas encore pu trouver de renseignements sur ses activités espérantistes , notamment à Saint-Claude, dans le Jura, entre 1903 et 1920, où il a été directeur d'une école privée, l'Institution Sainte-Marie (l'actuel Collège de la Maîtrise de la Cathédrale). Nos amis japonais parlent d'un club d'espéranto à Saint-Claude, mais il n'en reste pas de trace dans les archives de l'école. Tout renseignement complémentaire sera le bienvenu.



Vojago al la Luno, krozoj en la abismaj profundoj, novaj energioj, gigantaj kanonoj kaj strangaj mašinoj, la sciencia mirindeco de "Eksterordinaraj vojaĝoj" de Jules Verne antaŭvidis multon. Oni malpli scias, ke la mireginda anticipanto, je la fino de sia vivo, **entuziasmigis por la ideo de universala lingvo kaj pli precize por Esperanto** [... / ...].



Jam, en "Dudek mil mejloj sub la maro", la kapitano Nemo kaj lia ŝipanaro uzis misteran idiomon kaj en "La eterna Adamo" Jules Verne skribis pri la lingvo de niaj malproskimaj idoj de futura *Atlantido*. Jam ankaŭ, dum la jaroj 1880, Jules Verne aŭdis paroli pri la *Volapuko*, la efemera antaŭ-pioniro de Esperanto, konversaciante en sia jaĥto la "Saint-Michel", kun sia amiko, la junu deputito Raoul Duval, arda partizano de tiu idiomo, imagita en 1879, de germana prelato, *J. M. Schleyer*.

Je la komenco de 1903, esperantista grupo estis kreita en Amiens, kie Jules Verne logis, dank'al la impulso de Sinjoroj Charles Tassencourt, negocianto, amiko de la verkisto kaj Joseph Dellour, subestro de liceo.

### Interrompita romano

Jules Verne akceptis kun entuziasmo la prezidentecon de tiu nova grupo kaj promesis al siaj amikoj skribi romanon, en kiu li priskribos la meritojn de Esperanto. La verkisto komencis la laboron sed lia morto, la 24an marto 1905, interrompis lian verkon. . . La skizo estis uzita por la redakto de la romano "la miriga aventuro de la Misio Barzak" kies unua parto ĝi estas kaj kiu estis finverkita de Michel Verne, filo de la verkisto, el la notoj lasitaj de lia patro, sed. . . en tiu verko eldonita en 1919, oni ne plu trovas aludon pri Esperanto!

La afero reaperis kiam, en 1981, la urbo de Nantes akiris multajn neeldonitaĵojn, restintajn en la arkivoj de Jules Verne. Ilia aktuala publikigo ebligas malkovri, ke unu el tiuj manskribajoj estas la komenco de "Vojago de studio", la fama romano, kie Jules Verne **deziris doni rolon al Esperanto**. Tiuj manskribajoj estas eldonitaj en pluraj volumoj, de la eldonejo "éditions du Cherche-Midi" kaj "Vojago de studio" aperis en la volumo "Sankta Karlo" ( "San Carlo" ), titolo de unu el la teksto de la libro.

Tiu rakonto prezentas la membrojn de stud-komisiono, sendita en la kernon de Afriko, kaj kiu konsistas interalie el Ruso, *Nikolao Vanof*, komisiita por **instrui Esperanton al la membroj de la ekspedicio**!. La verkisto provizore lasis blankaj en sia mankribajo la tekstojn tradukendajn poste al Esperanto, imaginte ke "Esperanto, de pluraj jaroj, eniris la vastajn regionojn de centra Afriko, por la plej granda profito de la civilizo kaj de la komerco."

Finfine, lia prescienco de anticipanto eble ankoraŭ ĝuste vidis por la estonteco, ĉar de pluraj jaroj, asocioj de Esperanto-parolantoj daŭre kreiĝas en diversaj landoj de Nigra Afriko.

*LE COURRIER DE L'OUEST*

### ... el la kuirlibro de avinjo Odette ...

*poĉitaj ovoj en tomato-saùco*



Preparitan saùcon vi povos aĉeti aù mem fari... se vi havas specifan ĝardenon!... Vi disponu pri tomatoj... -el via ĝardeno se eblas-, petroselo, timiano, folieto de spiclaŭro raspita, muskato, salo kaj pipro.

Lasu kuirri, por ke la saùco ne estu tro likva... kaj trapremilu ĝin.

En kaserolon enverŝu litron da akvo; salu, aldonu kuleron da vinagro. Lasu boli...

Tuj post kiam la akvo ekbolas, dismetu la ovojn, ne pli ol du ĉiufoje.

Rompu ilin, lasu ilin fali en la boletantan akvon, plej proksdime de la akvo-nivelon. Per kulero volvu la „blankon” ĉirkaù la „flavon”, kiu restos likva... Unu minuton sufiĉas por tion fari.

Eltiru la ovajn per sen-ĉaumig-ilon, algutigu ilin sur sorbo-papero.

Vi povas tuj meti la ovojn sur la tomatosaucon... sed bone elgutigu!

Servu kun nudeloj aù rizo.

*Bonan appetiton!...*

# ESPERANTO EN MALAGASIO

Ni ricevis jenajn artikolojn el Malagasio de s-ino Justine RALALARISOA, kiun la geamikoj nomas Lala, kiel en la raporto. Si estas prezidantino de UME Unuiĝo de la Malagasaj Esperantistoj. Ni kore dankas ŝin.

A.G.

**Ĝoje UME informas ĉiujn esperantistojn pri la fondiĝo  
de nova esperantista grupo en Ambalavao.**



Prezidanto: RANDRIANASOLO H. Ginet Franklin  
Vicprezidanto: RANDRIAMBOLOLONA Jean Claude  
Sekretariino: RAZAFINDRALAMBO Mamy Tahirintsoa  
Kasisto: RAHERIMANDIMBY Henri Zazatsy  
Konsilantinoj: RASOANDRAINY Edmée  
RAZANAMALALA Jeanne Violette  
SOANANDRASANA Ramiadanarivony Noelfine  
Kontrolkomisiono: RAZAFIMANDIMBY Patrick Marcel  
Simplaj membroj: RASOLOFONIRINA Fidison Samuel  
RAMASIMAMONJY Jean de Dieu

## Nia Literaturo

Fidilalao Firaiana Henriel : juna esperantisto malagasa, kiu ne nur verkis sia-inspire sed ankaŭ tradukis poemojn de niaj famaj poetoj.

Jen kiel li priskribas nian urbon Antananarivo aù esperante la urbo de mil

### LA URBO DE MIL

Morne fleksas la reĝina urbo  
sub rigora puô de l'vintra vent'  
kiu grizajn suden alpelas nubojn.  
Vizaĝon sagetas mil pikeroj  
sed palac' olda plej suferadas.  
Gin envolvas ja nebul' peza  
nur supre svagas stampkontur'  
kaj senkompara frido unuigas nin.  
Via spit-fiero dorlotas min,  
dumtreme vin admiranta.  
Fumecas etos' konkeri ĉi montojn  
ventblekon, eĉ minacan, rumore frontas  
fidelaj subanoj de l'ebenajo.  
Baldaŭ vin malkatenas hel'  
per forviŝo al invad-spuro.

10.09.2001

## Nova esperantista Grupo en Ambalavao

Grupo esperantista  
Ambalavao  
G.E.A  
Adreso: IIIG 45  
Avaramanda  
MG 303 Ambalavao

## DOX

(Jean Verdi Salomon RAZAKANDRAINY ) multe verkis de 1940 ĝis 1958. Poeto de la amo, unu el la plej konataj en la malagasa literaturo.

### Surmetu miakapen

*Surmetu miakapen, tiom pezas la sort'  
Tiel glitas mia voj', ĉiu alkroĉig' al abort' !  
Min humidigas amo, kompatu l' viktimo  
Amato foriro... vi nur gapas tion !*

*Surmetu miakapen, alie versus sur grundon  
Tiu fleginda amo, amarigante korfundon  
Ĉu per Nenifarfoli' iu alhejmigos akvon ?  
Sed ne refrešigan mi trovos tian likvon !*

*Surmetu miakapen ! Nurias tiu ĉi kruĉo...  
Se ĝi disspliĉigus, mian amon kienus buĉo ?  
Malplenus la manoj, elreviĝo la premi'.*

*Surmetu miakapen, alie ne trafitus l'amato,  
Kiu plandis angulon, timigus vivo sen flato  
Se ŝia am' perdiĝus !  
Ho, distas jam inter ni !*

## Dox

Metafore, kruĉo kiu estas uzata nur por akvo, simboligas la fidelecon. Ĉe ni, ĝis nun, ĉefe en la kamparo kuranta akvo estas nekonata. En multaj vilaĝetoj vilaĝanoj iras al fonto por trovi akvon.

Ofte fonto troviĝas for. Do nepre necesas uzi sufice grandan kruĉon, kiun, helpate, oni metas surkapen.

La vorto "surkapigi" laŭsence evoluas. Ni surkapigas ĉiujn devigaĵojn (la laboro precipite kiam vi estas oficisto...), ĉiujn gravajojn. Dox la amverkisto volis montri kiom grava estas la amo. Tial li surkapigu ĝin.

Lala

# Voyaĝo tra MALAGASIO pere de ESPERANTO

Teksto de **sunkompanio** ricevita de Lala, kiun ni dankas pro ŝiaj kontribuoj.

A.G.



## DENOVE LA MIRAKLO DE ESPERANTO

En 2004 la sunkompanio vojaĝis al Togolando, kaj vere travisis Esperantan sperton. En 2005 invitita de franca amiko loĝanta en Malagasio, sunkompanio decidis kontakti la malagasajn esperantistojn.

Rete ni skribis al Lala, rete ŝi invitis nin kore. Alvante al Tananarivo, komence de januaro, kia surprizo, post longa flugado, renkonti Dina, filinon de Lala, kiu pacience atendis nin prezentante verdan stelon sur folio. Kia ĝojo ni jam estis amikoj! Ĉu vi povas imagi eniri la domon de niaj gastigantoj en tipa kvartalo de la enloĝantoj?

La akcepto estis varma, tiom amikema, ĉio iris glate, ni havis multon por aŭskuti, por diri, por vidi, por kompreni. Niaj gastigantoj multon klarigis al ni pri la ĉutaga vivo en Malagasio, tiel ni eble malpli misagadis dum nia vojaĝo. Komprenble ni ne celis resti en la ĉef-urbo, kaj tute nature Dina proposis akompani nin tra la ruĝa insulo. Ni ne povis esperi pri pli bona gvidantino. Si tre kapablis paroli la malagasan, la francan kaj Esperanto-lingvojn. Si estis gaja, vigla, scivolema kaj feliĉa vojaĝi kune. Dina estis nia suno dum la tutu monato.

Ni vizitis belegan naturon, kies bestoj kaj plantoj estas endemiaj en Malagasio. Ni miris pro la beleco de la pejzaĝoj, kvankam la homoj multe detruis la arbaron kaj la diversajn speciojn de plantoj kaj de bestoj.

Sed pli kaj pli da homoj konscias pri la valoro de sia lando kaj respektas sian teron. Tion ni malkovris en Ambalavao, kie nia franca amiko Guillaume laboras de tri jaroj kun la kamparanoj. Li eklernis Esperanton kun Ginet, junu enloĝanto de Ambalavao.



Komprenble ni ĝojis finfine vidi unu la alian. Post kelkaj korespondadoj per la reto, Ginet iomete malesperis pri la disvolviĝo de Esperanto en sia lando, ĉar liaj geamikoj ne multe reagis.

Sed li elkoris sentas sin esperantisto. Ni multe babilis kaj renkontis geamikojn... kaj unu semajnon poste la klubo de Ambalavao estis kreita. GEA (grupo de esperantisoj de Ambalavao) signifas ankaŭ ĝentileco en iu malagasa lingvo. La klubo konsistas el 11 anoj, inter kiuj, Jean-Claude, lerneja direktoro, kiu lernis Esperanton antaŭ 30 jaroj! Li montris sian diplomon datita de 1974.

Ni partoprenis la unuan kurson en mirinda etoso, la partoprenantoj pasie "trinkis" la vortojn el la bušo de la frešbakita prezidanto, nomata Ginet.

Ĉiuj atendas, esperas vizitantojn, geamikojn el la mondo. Ne hezitu, vi estos ege bone akceptitaj de tiuj klubanoj, kiuj klopodos por agradable gastigi vin kaj proponos al vi la ĉarman restoracion de Henri "La fraich'heure", kiu nun havas verdan stelon.

Ni plu vizitadis la insulon, renkontis Erneston, bedaŭrinde temis pri ciklono. Ni vagadis tra la kamparo per busoj, trajnoj, kampar-taksioj, pirogoj kaj revenis al Tana, ĉe niaj familianoj. Tie Guillaume kaj Ginet renkontis la centran lokon de la Esperanta vivo en Malagasio, kaj Ginet povis reveni hejmen kun tutnova metodo Malagasa-Esperanto en pošo.

Ni povas fidi niajn geamikojn; Esperanto bone fartas en la insulo! Ili intencas organizi sian nacian kongreson en aŭgusto, sed ĝuste timas mon-problemojn. Fakte la homoj estas ege malriĉaj kaj multon ne povas fari pro ekonomiaj problemoj. Eĉ simplaj aferoj, banalaj por ni, malhelpas ilin agadi.

Ni promesis reveninte Francion prirakonti la etoson, la varman akcepton de ĉiuj malagasoj, sed ankaŭ la malfacilajojn en lando, kiu povus esti paradizo.

Ĉu vi deziras pli multe sci? kontaktu nin:  
SUNKOMPANIO 09800 ARROUT Francio  
Tel. 05.61.96.82.08  
ret-adreso: [sunkompanio@wanadoo.fr](mailto:sunkompanio@wanadoo.fr)



**32** La unuan de majo okazis la malfermo de eksposicio pri Doktoro SCHWEITZER en la *rura domo* de *Kutzenhausen*, tiel kiel pluraj konferencoj, eksposicio vizitinda ĝis la 30a de septembro...

## D-ro Schweitzer hodiau...

Kiu estas Doktoro Schweitzer ?...

Li naskiĝis en *Kaysersberg* en 1875 kaj pasis sian infanecon en *Günsbach*, kie la patro estis pastoro. Li iĝis sinsekve kaj samtempe muzikologo, teologo, organisto kaj pastoro.

Poste li studis medicinon por flegi malsanulojn, ĉefe leprulojn, en *Lambaréne* ( Gabono ). Dumtempe li verkis plurajn librojn...

En 1952 li estis *Nobel-premiito pri la paco*. Li forpasis en 1965... 90 jaraĝa.

Min oni petis traduki dekdu el liaj pensoj en Esperanton, pensoj kiuj kuŝas sub la francaj en la aludita eksposicio... Jen du el ili :

*"Mi deziras iĝi kuracisto por havi la eblecon labori... sen paroli. ! Dum jaroj mi penege parolis... En tiu nova labormaniero, mi ne plu aperis kiel iu, kiu parolas pri la religio de l'amo, sed kiu klopodas ĝin praktiki ..."*

*"Ciu bonaj semoj, kiujn homo disigas tra la mondo iam ĝermos en la koro kaj en la penso de aliaj homoj".*

Amuza anekdoto... Iam venis ĵurnalisto, kiu demandis :

*"Oni rakontas, ke ĉiu bestoj, eĉ sovaĝaj, sekvas vin ( aŭtentike ) ... Kiel vi klarigas tion ?*

*- Nu, mi havis ankoraŭ kelkajn grajnojn en la pošo... sed tiu lasta estis truita !..."*

Mirinda ekzemplo de boneco, humaneco kaj amo kontraŭ aliuloj...

*Odette SCHEIDEL*



Naskiĝdomo de D-ro Schweitzer  
en *Kaysersberg*



D-ro Schweitzer  
en *Lambaréne*



Rura Domo en *Kutzenhausen*

## Kio pri Inter Ni ??

En la numero 129 de **La Informilo**, ni informis vin pri la forpaso de **Eugène Raveloson**, la redaktoro de la malagasa Esperanto-revuo **Inter Ni**. Tiam ni supozis, ke la edzino de Eugène Raveloson deziras transpreni la redaktadon de la revuo.

Intertempe **TAKE**, kiu peradis la abonojn kaj prizorgis la eldonadon kaj dissendadon de la revuo, rilatis kun **UME** (Unuiĝo de la Malagasaj Esperantistoj), kies prezidantino estas s-ino **Justine RALALARISOA**, kaj kun la familianoj de Eugène Raveloson. Efektive pluraj liaj familianoj ja dezirus daŭrigi la revuon.

Sed evidentigas, ke ili ne interkonsentas inter si kaj fakte ne regas Esperanton. La asocio **UME** eldonas enlandan modestan brošuron "**La voĉo de UME**" kaj ne deziras zorgi pri **Inter Ni**. En tiaj cirkonstancoj tre verŝajne venonta numero de **Inter Ni** ne baldaŭ povos aperi.

Tial ja necesas akcepti, ke tiel finiĝis la apero de la Esperanto-revuo **Inter Ni** kaj sam-okeze tutaj epoko, dum kiu **Eugène Raveloson** klopodis, laŭ siaj konvinkoj, disvastiĝi Esperanton en Malagasio. Tamen **TAKE** havas la zorgon pri la jam pagintaj membroj.

## Bonvenon al novaj abonantoj

Por solvi tiun problemon **TAKE**, inter-konsente kun **Orient-Franca Esperanto-Asocio** proponis jenan kompromizon. Anstataŭ liveri al la abonantoj de la jaro 2005 la revuon **Inter Ni**, nia asocio estas preta sendi sian bultenon "**La Informilo**". Ni esperas tiel eviti al ĉiu abonanto de **Inter Ni** perdi unu jaron da abono.

Ĉi-tiu numero estas la unua sendita al tiuj "novaj" abonantoj, kiujn ni plezure bonvenigas. Ni esperas, ke nia regiona bulteno **La Informilo** kaptos ilian intereson kaj atenton. Eble jam en ĉi-tiu numero aperas kelkaj artikoloj ricevitaj de **UME** pri Esperanto en Malagasio. Tio iel estas la kontribuo de nia asocio por la Esperanto-aktivco en Malagasio.

Al malnovaj abonintoj de **Inter Ni** (jaro 2004), ĉi-tiu numero estas sendita, kiel prov-ekzemplero. Volonte ni akceptos ilin abonen por la jaro 2005 kaj esperas tiel povi ilin informi pri Esperanto en nia regiono, en Francio, en la mondo kaj aparte en Malagasio. Bonvenon al tiuj estontaj novaj abonantoj.

André Grossmann

## MISTERA ARRESTITO

Laŭinforme tri jardekojn suferis en francaj arestejoj sennoma viro kun vizaĝo kovrita, kaŝita sub masko. Kiam poste, en 1789 en Parizo venkite falis la Bastilo en la manojn de revoluciuloj, en unu malnova forlasita ĉelo oni trovis skeleton per ĉeno alforĝitan al la muro. Laŭdire ĝi devis aparteni al viro kun la masko, enkarcerigita je ordono de franca reĝo Ludoviko la XIV-a. Pri kiu ja temis kaj pere de kio povis la mistera enkarcerigito endangerigi la cion-potencan regionon de la Suno?

Nur plenmaneto da homoj – inter ili la reĝo Ludoviko la XIV-a, konis la identecon de la Masko. La enkarcerigiton oni foje koharigis kun angla nobelo, devigita fuĝi el la propra lando, kiam malsukcesis la konspiro kontraŭ Vilhelmo la III-a, alifoje denove kun franca dramverkisto, punita pro malcastaĵoj aŭ kun nelegitima duonparenca frato de Ludoviko la XIV-a, naskiĝinta el ligo de Anna Rakouzská (Aŭstrio) kun la kardinalo Mazarin.

Kiel plua realajo vidigadis eksplikon, ke la masko estis italdevena kortegano, kiu servogajnis regionon koleron. En tiu-ĉi kazoo povis kiel masko roli certa ERCOLE ANTONIO MATTIOLI, ministro ĉe la kortego de mantova duko FERDINANDO CARLO GONZAGA, kaj kiu zorgis pri landlima fortikaĵo CASALE MONFERATO, kiun Ludoviko la XIV-a tre sopiris regi por vastigi sian influon en Italion. Kiam Mattioli vizitis la francan regionon en decembro 1677, li ricevis rarajn donacojn kaj ordonis aranĝi vendon de menciata fortikaĵo por 100 tolaroj.

Sed post la hejmenreveno, aŭ la kortegano sentis riprocojn, ke li vendis italan posedacon de Francio, aŭ li antaŭsentis eblecon de plua enspezo, kiu al li certigus ekscentran viromanieron. La sciugon (raporton) pri sekreta transakcio encirkulis lin en la imperiestraj kortegoj de Aŭstrio, Hispanio, en Venecio (Benátky), kaj en Savonio, sekve de kio la tutu Eŭropo poste sciis pri la intenco de Ludoviko la XIV-a en Italio. La reĝo de Suno estis devigita sian proponon je la fortikaĵo nuligi, sed pro la perfido, li venigis sin al Mattioli. En 1679 li forrabigis la italan korteganon en karceron en



Laŭdire temis pri knaboj. La unua naskiĝis tagmeze kaj tuj estis proklamita kiel la tronheredanto. Sed vespere naskiĝis dua knabo kaj ĝuste tiu laŭ tiamaj legoj, tiu devis esti konsiderata pli aĝa, oni konsideris la naskiĝon de la dua prefere sekretigi. La nerekonitan princon oni transdonis en prizorgon de akus-virino kaj al la regino oni diris, ke la dua infano mortis. Do, la fratoj maturigis ĉi memstare.

Dumtempe jam la vizaĝ-simileco de la dua junulo kun la reĝo Ludoviko la XIV-a estis tiom okulfrapa, ke li devis lin sendi en eksterlandon, en tiu-ĉi kazo en Anglujon, kie lin edukadis onklino de patra flanko. Sed post senracia malkašo far la kardinalo Richelieu, la knabo eksciis pri sia vera indenteco kaj strebis akiri rajton je la franca trono, kiu al li laŭleĝe apartenis. En sia 31-a jarago en 1669 li ligis sin kun franca Hugenoto ROUX de Marsily, sekreta agento de protestanta alianco kontraŭ Francio. Sed tiu-ĉi en Svislando retenis sekreta polico de Ludoviko la XIV-a kaj forportis en Parizon, kie li martirita mortis. Sed antaŭ la morto li malkašis, ke EUSTACHE DAUGER, viro, kiu en Anglio aperas kiel kameristo, estas en realeco la reĝa longtempe serĉata ĝemelo.

Kiam EUSTACHE DAUGER la 19.7.1669 venis al DUVVKIRK, li estis arestita kaj enkarcerigita en PINEROLA sub tiu la plej severa inspekto. Sed la inspektoro ĉiam kondutis plej respekte al li kiel al ano de reĝa sango. La enkarcerigito devis ĉiam porti nigran maskon, kiam ajn venis ia vizito aŭ se li veturis kun Saint-Mars en novan lokon de sia aktiveco.

Por neniu el la variantoj ekzistas sufice da konvinkigaj argumentoj. Tiuj, kiuj kune kun la reĝo konis la ververan misteron, tiuj tre atente ilin ne malkašis perletere, skrib-maniere, do ekzistas absolute nenia supozo, ke la viro kun la masko estis eble la laŭleĝa tron-heredanto.


Insulo Marguerite, malliberejo de la Fera Masko 1687 - 1698



unu fortikaĵo. Dum kelkaj jaroj, laŭdire post multaj transportoj, li finis en Pariza Bastilo.

Ankorau pli surprizige kaj dramatike vidiĝas la teorioj, kiujn indike aŭdigis jam la unua ministro de la reĝo Ludoviko la XIII-a, la kardinalo Richelieu, kiu en siaj rememoraĵoj malkašis, ke la reĝa edzino Anna Aŭstria 5.9.1638 naskis ĝemelojn.

Laŭdire temis pri knaboj. La unua naskiĝis tagmeze kaj tuj estis proklamita kiel la tronheredanto. Sed vespere naskiĝis dua knabo kaj ĝuste tiu laŭ tiamaj legoj, tiu devis esti konsiderata pli aĝa, oni konsideris la naskiĝon de la dua prefere sekretigi. La nerekonitan princon oni transdonis en prizorgon de akus-virino kaj al la regino oni diris, ke la dua infano mortis. Do, la fratoj maturigis ĉi memstare.



Estimata Pol,

Tiu ĉi kelkaj lastaj monatoj certe estis la plej produktivaj dum la tuta historio de Vinilkosmo ! Eta retrospektivo nepras, kaj por la okazo vi trovos en nia TTT-paĝo ĉiujn frešdatajn referencojn prezentitajn antaŭ ol fari paŭzon por profiti je la belaj sunaj tagoj.

Plie, eta surprizo, tiom por vi kiom por ni, alvenis por simboligi la vojon tra ritman depost la unuaj heroecaj surbendigoj, kaj ankaŭ novajo el *Ukrainio*, kiu montras kiel esperanto viglas en Orienta Eŭropo, tiel riĉigante la muziko-kolekton, kiu ne ĉesas pligrandigi.

Kun la eŭropsomeraj tagoj, alvenas ankaŭ la unuaj renkontiĝoj kaj la preparoj de diversaj festivaloj kaj kongresoj rapidetas, anoncante varman someron por la esperanto-geamikoj el la tuta mondo.

Enmanigu viajn agendojn, kaj ekakrigu viajn orelojn !

Nia kompleta katalogo ĉe : <http://www.vinilkosmo.com>

### Vinilkosmo - novajoj

**VKKS 28 "Tute ne gravas"**

#### AMPLIFIKI

Ĉu muzikkasedo en 2005 ? Tamen jes, kaj ĉi tio ne estas ŝerco, sed unika kaj limigita okazo por kolektantoj, recenzistoj, kaj nostalgiuloj ! Estis hazarde retrovita en la kelo de Eldonejo LF-Koop, tiu kvazaŭ enfosita trezoro; temas pri la unua esperanto-rok-kasedo eldonita en Esperantujo en 1986 de la rok-bando Amplifiki. Tiu retrovita stoko estas sen banderoloj, sed la kasedoj estas novaj kiel de la unua tago !

Post represado el unu el la originalaj de la tiama banderoloj, *Vinilkosmo* proponas al vi kun iom da malfruo, certe, sed senkomplekse, ĉi tiun nemalhaveblan raraĵon. Konsistanta el Micke (Svedio), Kim, nuna membro de *Esperanto-Desperado* (Danio), Bertilo et Martin, fondintoj de la fama bando *Persone* (Svedio), kaj Aline kaj Isabelle (Francio), *Amplifiki* estis siatempe la stela bando dum internaciaj renkontiĝoj de la esperanta junularo. Tra tuta Eŭropo la efiko de ilia pure rokenrola muziko kun nuancoj de bluso estis adoptita de ilia publiko, starigante *Amplifiki* kiel ikonon de la esperanta rok-movado.

En ĉi tiu kasedo vi povos trovi mejlostonajn titolojn kiajn "Sed tute ne gravas", "Domo en Bonn", "Brava bardo", "Ruĝo kaj blu", "IS", kaj la neforgesebalan "Sola" komponitan kaj kantitan de Kim, titolo, kiun ĉiuj espojunuloj el la tuta mondo konas kaj kunkantas. Notindas, ke ĝi reaperis en la unua KD de *Esperanto-Desperado 'Brokantafoj'* (VKKD 34).

Tiu escepta oportuno reenmergiĝi en la primicojn de esperanto-rokmuziko estas akompanata ankaŭ de broŝuro kun la tekstoj kaj fotoj de la tiama bando.

Trafenda okazo antaŭ kompleta kaj neinversigebla elĉerpigo

...Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi :

<http://www.vinilkosmo.com//?disc=vkks28&lng=e>

«»

**VKKD 80 "Ukrainaj Kantoj en Esperanto"**

#### ESPERO EL UKRAINIO

Popolkantoj estas la plej granda spirita valorajo de la ukraina popolo. Ili montras la vivon de la popolo, ĝiajn revojn, ĉiutagajojn, historiajn eventojn..

En tiu ĉi disko estas prezentitaj ukrainaj popolkantoj, kiuj venis precipe el la okcidenta parto de Ukrainio, dank'al la aktiveco de tieaj esperanto-tradukistoj; sed ankaŭ de aliaj partoj, ekzemple *Mikaelo Bronstejn*, kiun ni jam bone konas (vkkd54, vkkd55, vkkd60), kaj kiu antaŭe vivis en Ukrainio !

Iniciatis kaj preparis la diskon *M. Lineckij*. Krome, la disko aperis dank'al kontribuoj de *A. Abrahamjan*, *S. Ĉanturija*, kaj *M. Bronstejn*.

La realigo estas manfarita; ĝi proponas originalan prezenton en esperanto kaj en la ukraina. En la kantaro estas prezentitaj tri variaĵoj de la teksto: en Esperanto, en la ukraina, kaj en la ukraina laŭ esperanta ortografio kun indikitaj akcentoj.

En la unua strofo kaj refreno de la kantoj troviĝas literaj indikiloj de la akompan-akordoj. Eblos do al la aŭskultantoj kunkanti fiore kaj kunvivi la ĉarmon de ĉi tiuj kantoj, kies diversaj temoj, ŝercaj kantoj kun vigla kaj bonkora popola humuro, aŭ historiaj kantoj de la XVIa-XVIIa j.c., respegulantaj batalojn de la kozakoj kontraŭ la malamikoj.

Tiu ĉi disko estas manfabrikita de la artistoj mem.

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi :

<http://www.vinilkosmo.com//?disc=vkcd80&lng=e>

«»

**Centjariĝo de la esperanto-kongresoj en Bulonjo ĉe Maro**

Dum Paska semajnfino, de la 25-a ĝis la 30-a de marto 2005; la kongreso de *Bulonjo-ĉe-Maro* (norda Francio) kunigis esperantistojn el tuta Eŭropo por festi la centjariĝon de la unua Tutmonda Esperanto-Kongreso.

Muziko estis bone reprezentita jam okaze de la inaŭguro per paradmaršo de la kongresistoj gvidataj de urba fanfar-bando de Bulonjo, de la Urba Teatro ĝis la urbodomo. Meze de tiu promenado en la urbo okazis halto en la Zamenhof-Placo, kie estis deponitaj florgarboj ĉe la busto de la patro de esperanto. La esperanto-himno "La Espero" antaŭis la franca himnon "La Marseillaise", la tuto kun oficiala plena pompo....

Neniu iam vidis tion!

La muzika budo de Vinilkosmo, prezentanta ĉiujn produktojn de ĝia katalogo, vere estis rimarkita. La etoso estis garantita de Djo Flo, de la bona humoro de Rikardo, kaj de la gejunuloj de JEFO, kiuj dancis je ritmoj de roko, skao, kaj regeo de la bandoj Strika Tango, Esperanto Desperado, La Rolls, JoMo, La Porkoj, Dolchamar, ktp., kaj ankaŭ de la elektronika versio de "La Espero" de Ralph Glomp.

Dimanĉvespera la fama kantisto internacia kaj loka Jacques Yvert, ( VKKD 19 ) faris brilan prezenton de pluraj novaj esperanto-kanzonoj, kaj por fini prezentigis la korusa ensemblo Meven ( VKKD 43 kaj VKKD 71 ). Kvalita spektaklo, kiu vojaĝigis nin sur la maroj de la mondo, kun nekutima surscenejigo ,

Sekve de la spektaklo de Jacques Yvert la publiko unuanime petis duan albumon....

Jacques Yvert helpe de pluraj tradukistoj, inter ili Marcelo

Redoulez de la Kompanoj ( VKKD 25 ), ekis laboron por nova KD-projekto de tradukoj de la propraj kantoj de Jacques eltiritaj el pluraj liaj albumoj, 'Bonjour la Paix' ( Bonan tagon, Paco ) 'Citoyen du monde' ( Mondcivitano ), ktp., kaj eble ankaŭ originaj titoloj en esperanto.

La projekto eble bezonas almenaŭ du jarojn da laboro antaŭ ol la disko pretos, kun intertempo turneo de Jacques por poluri la kantojn sursceneje antaŭ ol ilin registri.

Jen do tuta programo pri kiu ni parolos en oportuna momento....

Daŭrigote....

<><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><>

**NEJ, 40-a datreveno**

Okaze de la 40-a datreveno de NEJ ( Nederlanda Esperanta Junularo), estas organizata renkontigo okazonta de la 10-a ĝis la 12-a de junio 2005 en Middelburg en Zeeland ( Nederlando ).

EUROKKA estis invitita por gvidi seminarion pri esperanto-muziko.

Por pliaj informoj kaj por aliĝi :

<http://www.esperanto-jongeren.nl/pr2005.html>

<><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><>

**KEF 2005**

*Kultura Esperanto-Festivalo* ( KEF ) okazos en Helsinki ( Finnlando ) de la 16-a ĝis la 23-a de julio 2005. La temo de la festivalo estos "Korpo kaj Kulturo". En la programo ( provizora ): panelo de la plej elstaraj esperanto-artistoj aktualaj: Dolchamar ( Finnlando ), Esperanto-Desperado ( Danio/Bosnio ), JoMo kaj Liberecanoj ( Tuluzo/Okcitanio/Francio ), Alejandro Cossavella de Strika Tango kaj La Porkoj ( Argentino ), Flávio Fonseca ( Brazilo ), Ŵomart & Nataša ( Svedio/Kazafio ), Martin Wiese ( Stokholmo/ Svedio ), ktp.

Por tiu okazo estos prezentiĝa unuafoje oficiale la artista datenbazo fare de David Emil kaj Flo de EUROKKA.

Por pliaj informoj kaj por aliĝi :

<http://www.esperanto.fi/kef2005/>

<><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><>

**Kantaro-Vikio**

Ĉu vi jam aŭdis pri la Kantaro-Vikio de Ljoshka Kuznecov?

Kantaro-Vikio estas unika ret-paĝaro kunigante unu el la plej grandaj kolektoj de kantoj en esperanto. Ĉar tiu paĝaro funkcias kiel Vikipedio, ĉiuj kiuj volas kontribui povas facile fari modifojn ( se necese ) en la jam ekzistantaj paĝoj, kaj fari novajn.

En tiu kantaro vi trovos novajn kantojn, sed ankaŭ "klasikajn" kiel ekzemple "La Espero", "IS", "Sola", "Hotel California".

La lastaj paĝoj aktivigitaj prezentas kompletan kolekton de kantoj de Persone kaj de Merlin.

La rubrikoj estas klasitaj laŭ titoloj: "Kantotekstoj", "Tekstoj kun akordoj", "Melodioj por poŝtelefono", "Informoj pri albumoj de e-bandoj", ktp.

Krom la teksto kaj gitar-akordoj por amatoraj muzikistoj, eblas trovi ankaŭ diversajn ligojn al aliaj retpaĝoj pri esperanto-muziko.

Do, se vi havas intereson pri esperanto-muziko, vizitu tiun ĉi ret-kantaron, uzu ĝin, kaj alportu en ĝin viajn kontribuojn....

<http://www.ikso.net/kantaro>

Info de Ljosa KUZNECOV

[www.ikso.net/kantaro](http://www.ikso.net/kantaro)

<><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><><>

**Himno je Ĝojo en Japanio**

S-ro Konisi Gaku adaptis la poemon "Himno je Ĝojo" ( Al la ĝojo ) de Schiller tradukita al esperanto de K. Kalocsay por la flora finalo de Simfonio N-ro 9 de Beethoven.

Esstis eldonita kompleta libro enhavanta la partiturojn kaj tekstojn.

Eblas rekte mendigi por 6 eŭroj plus sendokostoj ĉe :

KLEG ( Japana Esperanta Librokooperativo ) Sone-higasi 1-11-46-204

Toyonaka-si Oosaka-hu JP-561-0802 Japanio

[kleg@mvf.biglobe.ne.jp](mailto:kleg@mvf.biglobe.ne.jp)

<http://www2u.biglobe.ne.jp/~kleg/esperanto.htm>

aŭ en la libroservo de UEA

### Info de Mine Yositaka

»»»

### Tutmonda Roko

*JoMo kaj Liberecanoj el Tuluzo ( Okcitanio/ Francio ).*

*JoMo proponos al ni kvalitan albumon je kio li kutimigis nin, sed krome ankaŭ novan muzikkoncepton, kiun li nomas "Tutmonda Roko".*

Dankon pro via atento !

Plej muzikajn bondezirojn al ĉiuj legantoj!

Redaktita por vi de Floreal Martorell kaj Mark Eaton



## Ni vivigu niajn esperanto-presajojn !



Estimata,

... En la dokumentoj, kiujn vi ricevis dum la kongreso "Boulogne 2005 Esperanto", vi trovis ankaŭ provnumeron de MONATO, la internacia magazino sendependa. Ni certas, ke intertempe vi havis la tempon por trafolumi, aŭ por grandparte legi ĝin...

Vi povis vidi, ke MONATO regalas al vi per noveloj, multaj recenzoj pri novaj kompaktaj diskoj kaj libroj, per turismaj kontribuoj kaj per rubrikoj kiel Politiko, Moderna Vivo, Scienco, Lingvo, Hobio, kaj multe pli kaj ĉio tio kompreneble en senriproča hodiaŭa Esperanto kaj bunte ilustrita!

Ekzistas la "klasika" MONATO, kiu estas sendita al vi per la pošt, sed ekzistas ankaŭ malmultekosta reta versio, kiun vi povas mem presi per via propra printilo, tiel ŝparante afrankon kaj gajnante multe da tempo.

Por ke vi ekkonu MONATOn, aŭ denove interkonatiĝu, la eldonejo ne nur donacis al vi tiun ekzempleron en Boulogne, sed donacos al vi **tri pliajn numerojn!** Jes ja, ĉiuj kiuj ekabonas nun, ricevos la magazinon MONATO dum 15 monatoj kaj pagos nur 12!...

Kaptu do tiun unikan oferton, kaj plenigu la kuponon, kiun vi trovos en

[http://www.esperanto.be/fel/mon/abonilo3\\_3.php](http://www.esperanto.be/fel/mon/abonilo3_3.php)

Vi vidos, ke la mondo igas por vi nun malpli kosta!

Kun sinceraj salutoj,

la MONATO-skipo <http://www.monato.net>

## Problemo... solvebla! ===== \*



Tuta familio, kies motorboato ĵus paneis nur kelkajn metro-centojn de la kontinento, decidis atingi ĝin per la sav-ŝalupo de la boato. Sed tiu ŝalupo ne povas akcepti ŝarĝon, kiu superus 90 kilogramojn!

La patro pezas 84 kg-ojn, la patrino 65, la filo 45, la filino 40 kaj la hundo 8 kg-ojn... Ĉiuj tamen sukcesis albordi la kontinenton! Kiamaniere?

... dernière minute !

Saluton !

Après *Tintin*, *Astérix* et quelques autres héros de bande dessinée, c'est au tour de *Gaston Lagaffe* de parler en espéranto. *Esperanto-Jeunes* se lance dans l'édition en faisant paraître le premier album en espéranto des aventures du plus célèbre gaffeur de l'histoire de la BD.

*Gaston Lagaffe* est né sous la plume d'*André Franquin* en 1957, 19 albums existent actuellement en français, il est édité en 8 langues et sort enfin en espéranto. Que voilà une excellente nouvelle !

L'album est au prix de 8 € à commander d'urgence à notre libro-servo ( 37, rue P. et M. Curie, 54500 VANDOEUVRE ) ou [libroservo.efe@wanadoo.fr](mailto:libroservo.efe@wanadoo.fr)

N'hésitez pas à retransmettre l'info et bonne lecture !



Nia agema amikino Ginette MARTIN, malkovris en "Salono de kolektantoj" en Gérardmer la revuon "Nos Loisirs" -jaro 1913 !, kies frontpaĝo okulfrape aludis Esperanton... Ene troviĝis specifa paĝo, kiu certe interesos niajn legantojn, bedaŭrinde nur francparolantajn... Ni pensis opportune, kaj eble amuzige, aperigi tiun "Grandan Konkurson" en nia bulteno. Kiu scias ?... Kelkaj tradukemuloj plezure ŝatus proponi sian verkon, imagante la premion, kiun ili eble povintus ricevi... antaŭ 92 jaroj, dank'al la tiama esperanto-mecenato, M. Michelin, tiom pli ke la lupo daure "ĉefrolas" en la aktualajoj de 2005!

Ni bonvoleme publikigos kelkajn taskojn en la n° 131, submetotaj poste al ekzamenantaro konsistanta el la kutimaj kursgvidantoj de niaj regionaj stagoj, ekzamenantaro, kiu elektus la premiotan laureaton !... Nia libro-servo povus roli kiel anstataŭiganto de la aludita mecenato, ĉu ne ?...

PS - Tekstojn oni sendu al la redaktejo.

# Grand Concours Général d'Espéranto

OUVERT PAR "NOS LOISIRS"

Nous donnons ci-dessous le texte que les concurrents devront traduire en Esperanto. Nous leur rappelons que, dans cette traduction, ils ne devront employer que les mots qui se trouvent dans l'Officiala Radikaro de M. Boirac (Librairie Hachette, 0 fr. 50).

Les compositions devront être écrites autant que possible sur du papier format commercial 0<sup>0</sup>21×0<sup>0</sup>27 et elles ne devront porter aucune indication permettant de connaître leur auteur.

Les concurrents joindront à leur composition :

1° 0 fr. 50 (droit d'inscription) en timbres-poste de

0 fr. 10 ou mandat au nom de M. le directeur de Nos Loisirs;

2° La déclaration qui se trouve au bas de la page, qu'ils devront remplir très lisiblement et découper.

La composition, le droit d'inscription et la déclaration devront être adressés, dans la même enveloppe, de façon à parvenir avant le 10 avril, à minuit, à l'adresse suivante :

Monsieur le Directeur de "NOS LOISIRS"  
(Concours d'Espéranto)

18, rue d'Enghien, Paris

## TEXTE DU CONCOURS

Le loup est un des animaux qui aiment le plus la chair et cependant il meurt souvent de faim parce que l'homme lui a déclaré la guerre et le force de fuir dans les bois où il ne trouve que quelques animaux sauvages qui lui échappent par la vitesse de leur course. Il est naturellement craintif et il ne devient courageux que par besoin. Pressé par la faim, il brave le danger. Mais, s'il se bat, ce n'est que par nécessité et jamais par un mouvement de courage.

Les noms des concurrents admis à participer à la seconde épreuve paraîtront dans notre numéro du 1<sup>er</sup> juin. Cette seconde épreuve sera passée dans des centres d'examen, dont nous avons déjà donné, mais dont nous donnerons de nouveau la liste dans ce même numéro. Elle aura lieu le Dimanche 8 Juin.

## LISTE COMPLETE DES PRIX ATTRIBUÉS À NOTRE GRAND CONCOURS D'ESPÉRANTO

(Prix en espèces offerts par M. MICHELIN)

1 Prix de 2,000 francs.....	Fr. 2,000	25 Prix de 200 francs.....	Fr. 5,000
1 — de 1,000 — .....	1,000	80 — de 100 — .....	8,000
2 — de 500 — .....	1,000	300 — de 20 — .....	6,000
Solt : 379 Prix = 20,000 francs			

DÉCLARATION A DÉCOUPER ET A JOINDRE A L'ENVOI :

### Concours Général d'Espéranto ouvert par Nos Loisirs

NOM ET PRÉNOMS :

DATE DE NAISSANCE (1) :

ADRESSE :

Je déclare avoir fait seul la composition ci-jointe.

SIGNATURE :

(1) Le Concours n'est ouvert qu'aux jeunes gens et jeunes filles ayant EN MOINS DE 20 ANS RÉVOLUS au 1<sup>er</sup> Janvier 1913.

*ni provu rideti!...*



La Direktoro;  
„Fraülino Elisa, ĉu tute libera vi estas venontan dimancon?“.

Rugigante kaj certagrade ekscitita respondas fraülino Elisa:  
„Je... je.... jessss! Estimata Direktoro... - Nu, bone... Ne forgesu enlitigi sufice frue por ne alveni malfrue venontan lunden, kiel lastfoje!“.

\*  
Tiu frešbakita patro plendas ĝe amiko pri oftaj ploradoj de la bubeto...

„Sed, kial ci ne konsilas al cia edzino, kanti taŭgajn ariojn ĉe la ploranta bebo?  
- Hej... ŝi provis, sed venis najbaroj, kiuj diris, ke ili preferas audi la plorojn de la etulo!“.



Du blondulinoj babilas...

„Mi ja ne estas tiom stulta kiel asertite!  
Mi ja bezonis nur tri horojn por reordigi tiun puzlon...  
- Nu, kion pruvas tio?  
- Vidu, sur la skatolo oni povas legi: „de 4 al 7 jaroj...“



Johaneto pri demandas la patron;  
„Paĉjo, kio estas heredeco?  
- Aj!... Malfacile ekspliki... Tamen jen ekzemplo... Se mi ne povintus naski infanon... ankaŭ ci ne kapablus!“.



Ne speciale svelta, klientino eniras apotekejon por havigi al si specifajn kremojn kaj pilolojn, pensante aspekti pli alloga dum la feritempo...


Dum dejorantino preparas la pakojon, la scivola klientino flustras en ŝian orelon:  
„Fraülino, diru al mi... kiom mi povas perdi uzante tion ĉion?“  
La junu dungitino finpretingas la fakturon, okulumas oblike al la apuda apotekisto kaj duonlaŭte sufloras:  
„Iom pli ol 200 eurojn...“

Iun tagon okazas akra disputo sine de paro... La edzo ne plu volas audi unu solan vorton de la edzino... „Se ci deziras informi min urĝe, sribu tion sur slipeton... Tutsame mi faros!“

Iun vesperon la viro redaktas informon sur paperfolion, kiu tekstas... „Morgaŭ matene mi rendevuos frue kun amikoj por ĉas-momento... Veku min je la kvina...“, kaj dernetas ĝin sur la noktotablon de la edzino...

... Kiam li subite vekiĝas, indikas lia brakhorloĝo la naŭan!... Okukumante apuden, li malkovras slipeton sur sia propra noktotabolo... Ĝi tekstas: „Estas la kvina, karuleto... Vekiĝu!“.

En „Naturparko“ promenas libere du azenoj... kiuj preteriras kaĝon, kien oni provizore enirigis du frešaĉetiajn zebrojn...  
„Okulumu!... Ilin oni ja eĉ vestis kiel enkarcerigitojn!“.





\*  
Ĉe la birdo-vendisto...  
„Bonan tagon, Sinjoro... Papagon mi dezirus aĉeti.  
- Bedaŭrinde Sinjorino, mankas tiaj birdoj momente... sed mi povas proponi al vi ĉi-tiun pegan!  
- Sed, ĉu parolas tiu birdo?  
- Sincere, ne... sed la morsan alfabeton ĝi majstras!“

\*  
Jen la unua tago de la lernej-tempo. Antaŭ la pordo atendas la geknaboj... La Direktoro alparolas novulon:  
„Kiel vi nomigas, etulo?  
- Olivero, sinjoro Direktoro.  
- Eksici, ke en ĉi-tiu lernejo oni uzas nur la familiaran nomon... Kia ĝi estas?  
- Minkisuvī, sinjoro Direktoro...  
- Bone, Olivero, vi rajtas eniri!“


\*  
La junu Petro kuſas en lito pro akra gorĝ-doloro...

Post aŭskultumado li pridemandas la kuraciston:  
„Sinjoro Doktoro, tre, tre kuraĝa mi estas... Al mi vi povas tut sincere diri la veron... Kiam mi nepre devos reviziti la lernejon?“





# 09 STRANGULO



## Kebeka humuro...



## libera traduko...

Propono de plibonigo pri la kontrolo (Montreal) de la hundoj, kiuj "suprenlevas la piedon" ...

...krom en la kazo se ili markostampas sian teritorion, en tiu kazo la "francbojantaj" hundoj (?) devas pisi dufoje pli ol la "anglobojantaj" (?) hundoj...

NB : sur la ŝildeto kuſas  
franclingve :

KOMISIONO  
DE PROTEKTO  
DE LA FRANCA LINGVO



## Stvbrnz

Sub tiu kodigita teksteto vi malkovros pensigan aserton de Raoul FOLLEREAU \*\*\* "mesaĝo al la monda junularo", kies traduko franclingva, germanlingva kaj esperanto-lingva kuſis sur la diplomo dediĉita al la premiitaj gelernantoj de la kolegio Louise Michel en ETAIN (55). Vidu artikolojn prie en ĉi-tiu bulteno.

Ĉiuj literoj estas anstataŭigitaj per aliaj. Ekzemple, ĉiuj a de la normala aserto fariĝis e en la enigma.

\*\*\* Raoul FOLLEREAU estis inicianto de tutmonda movado por lanĉi kuracadon de la lepro.

g e k   g f b   s e j n k n   t n j s e r ,   c f e z   v f   e s  
r h p s n   p r h e r   e s c k n g f h e

## „Duon-vortoj”

... en ĉiu enigma

Horizontale: 3 sesliteraj vortoj

Vertikale: 1 naǔlitera vorto

- - - → e t o	- - - → a k o
↓	↓
- - - → i n o	- - - → a ĵ o
↓	↓
- - - → p t o	- - - → b i o

## Piramido

al la unua silabo **I a**  
aldonu ĉiufoje unu literon  
por atingi la sepan vorton.

<b>I a</b>	- - -
	- - - -
	- - - - -
	- - - - - -
	- - - - - - -
	p a t r o l o j

## Solvoj de la lastaj enigmoj – N° 129

1 – silab-enigmo: *ju cerbo pli prudenta, des lango pli silentia*

2 – stvbrnz: *ne helpas kuregi, estas pli bone ekiri ĝustatempe*

# ... el nia fototeko ...



Internacia junul-grupo antaù la Parlamento de Strasburgo,  
kiun ili vizitis en la kadro de *euroscola* – evento

Bulonjo-ĉe-Maro  
marto 2005



Granda surstrata parado  
de la 550 partoprenantoj... el 23 landoj !